# *Tago de la Nacia Ribelemo: alvokas Raúl Castro plu subteni tian spiriton.*



La kuba prezidento Raúl Castro, alvokis la popolon de Santiago de Kubo subteni sian revolucian kaj ribeleman spiriton, kio ilin karakterizas, okaze de tiu ?i nova datreveno de la historiaj sturmoj al kazernoj Moncada kaj Carlos Manuel de Céspedes la 26-an de julio 1953.

La centra solena?o okazis en la malnova fortreso milita en Santiago de Kubo, kaj ?i-foje ?irka? 10 mil lo?antoj elvokis la agon komanditan de Fidel Castro kun aliaj revoluciaj gejunuloj.

Raúl esprimis fine de la ceremonio: “Mi foriras kun la fidela espero ke ?iam Santiago estos Santiago”.

Dum la kulturpolitika ceremonio la kuba vicprezidento José Ramón Machado Ventura faris la ferman paroladon.

La ceremonion anka? partoprenis miloj da aktivuloj de la solidaremo kiuj venis al Kubo el diversaj latitudoj por dividi la ?ojon okaze de tiu ?i historia dato, kiu estas konsiderata kiel  la Tago de la Nacia Ribelemo.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/63884-tago-de-la-nacia-ribelemo-alvokas-raul-castro-plu-subteni-tian-spiriton

**Radio Habana Cuba**